THE BRITISH ESPERANTIST

The Official Organ of the British Esperanto Association



with which is incorporated International Language

Vol. XXXIV, No. 459/460 Price 4d. July/August 1943

THE British Esperanto Association consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress ; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues, but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them.

YOU

are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership :—

Subscription : 5/- per annum. (Persons joining after 1st July may pay 2/6 to end of current year—those under 18 may join as Junior Members at half-rates).

If you desire the Year Book of the International Esperanto League, add 4/-.

To the Secretary, The British Esperanto Association (Inc.),
Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

I,..

hereby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (*Inc.*) *and enclose the first*

Subscription of..............................

Signature ....

Nationality.............................. *Rank, Profession or Occupation*..............................

Address ....

....

Date.............................. *Age* (*if under* 18)..............................

Printed by Sumfield & Day, Ltd., Station Street, Eastbourne, for the Publishers, The British Esperanto Association, Inc., Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

The
British Esperantist
THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

Vol. XXXIV, No. 459/460 JULY/AUGUST 1943

NIA JARKUNVENO

La kunveno en Southport allogis 130 ĉeestantojn—multe pli, ol dum multaj jaroj. S-ro Oliver, kiel Kasisto, raportis, ke la deficito por la pasinta jaro estis nur okono de la deficito en 1938. Dume nia membraro kreskas tre kontentige: kaj tio estas la plej efika rimedo fortigi la Asocion. Li volus vidi mil novajn membrojn en 1943. Kun ĉies kunlaboro, kial ne?

Vespere okazis tre ĝuinda societa kunveno, ĉe kiu la Urbestro de Southport oficiale bonvenigis la membrojn. La kunvenon aranĝis la loka grupo: partoprenis S-ro Currie el Stockport kaj S-ro Bardsley el Oldham, kaj lokaj kontribuoj estis solkantoj (G. H. Henderson, H. P. Douglas); humoraj duetoj (Ges. Steele), kaj komedietoj (F-inoj Hoyle kaj Liversidge, kaj S-ino Steele; S-ino Barlow; S-roj Harris, Henderson, kaj Steele). Entute bonega programo! Post komuna kantado la kunveno finiĝis per ludoj kaj dancado, kun S-ro Oliver ĉe la piano.

Oni ŝuldas sinceran kaj varman dankon al la Grupo en Southport, kaj al ĉiu, kiu helpis al la sukceso de la kunvenoj: aparte al la energia sekretario, F-ino C. Liversidge, pro admirindaj aranĝoj kaj senlaca laboro.

La antaŭan vesperon S-ro F. Parker el Burnley faris lumbildan prelegon: *Esperanto from North Cape to Gibraltar and from Lisbon to Warsaw*, sub la prezido de S-ro H. P. Douglas. Ĉeestis 150. La prelego kaj la bildoj konvinke kaj interese montris la utilecon de Esperanto. Sekve de la prelego, kaj de la intereso vekita dum la semajnfino, stariĝis nova kurso, sub la instruo de S-ro L. Shipp: sendube la Grupo gajnos el tio novan sangon.

Aperis bonaj raportoj en la loka gazetaro. Dum tuta semajno rimarkinda ekspozicio de Esperanta Literaturo montriĝis en la enirejo de la Publika Biblioteko. Formala raporto pri la Ĝenerala Kunveno sekvas.

ANNUAL GENERAL MEETING

held at Salt's Café, Southport, on May 22nd, 1943, at 3 p.m.

Present:—The President, the Hon. Secretary, the Hon. Treasurer, and over 100 members.

The Minutes of the previous meeting were read, approved, and signed.

Annual Report and Accounts—The Report and Accounts for 1942, as published in the Journal, were unanimously adopted. A vote of thanks to the Officers for their effective work during the year was passed with acclamation.

Officers and Council, 1943-44—The following were declared elected:—

President: Miss Margaret Jay.

Vice-Presidents : Prof. W. E. Collinson, Miss V. C. Nixon, Robert Robertson.

Honorary Secretary : Bernard Long.

Honorary Treasurer : Arthur C. Oliver.

Councillors (1943–46) *:* E. D. Durrant, Mrs. E. M. Kendrick, W. K. Nash, G. L. Preedy, Miss P. M. Strapps, Mrs. E. Warren.

Auditor—Mr. H. Milsom, F.C.I.S., A.T.I.I., was elected Auditor for the ensuing year.

Annual General Meeting, 1944—No invitations had been received for this meeting, and the matter was left in the hands of the Executive Committee.

The Annual Subscription—The Resolution proposing the raising of the subscription of an Ordinary Member to 6s. and that of a Junior Member to 3s., as from January 1st, 1944, was submitted in the terms published in the March–April issue of the Journal. The Acting Secretary read several letters (mostly in favour of the proposal) which had been received from members and Groups, and considerable discussion followed, in which various aspects of the question were dealt with. On a vote being taken, the Resolution was carried with only six dissentients.

Junior Membership—As an outcome of the above discussion, Mr. B. McGrath proposed, and Mr. F. Parker seconded, a Resolution permitting Junior Membership to be available to persons under 21, instead of 18 as heretofore. The Resolution was carried unanimously.

Petition to H.M. Government—In reply to a question, the Acting Secretary stated that during 1942 the results of the Petition, with an analysis of the signatures, had been submitted to the President of the Board of Education, and that a not unfavourable acknowledgment had been received. Any further action would depend on circumstances. (It may here be mentioned that the final total of signatories was 24,769, of which 2,581, i.e., over 10 per cent., were teachers).

The official proceedings summarized above were followed by a discussion, in Esperanto, of various points of interest ; in particular, of methods of following up the work of the Education Secretary in the schools.

VENAS LA TAGO

Trans la vastan ebenan ondaron la suno sendas lumradiojn, kiujn la altaj montpintoj kaptas kaj tenas. Ŝajne venas el la maro mem ia granda ruĝflava pilkego. Pli kaj pli hela estas la suno en ĉiu postira minuto. Oraj nuboj montras randojn flavajn, poste arĝentajn, kaj fine tute blankaj nuboj rebrilas al la tero kaj la maro la fortan lumon de la suna disko.

La dolĉa frumatena vento blovas la foliojn sur la arboj, kaj tiuj konkuras kun la ondoj per sonoj plaĉaj al la orelo de la maljuna viro, kiu staras sur la alta klifo. Du lacaj okuloj, plenaj de sopiro, direktas longan rigardon al la horizonto. La bruo de la ondoj kaj arboj kaŭzas kordolorojn en lia brusto, ĉar tie, fore, malproksime trans la maro, li iam loĝis en marborda vilaĝo inter la maro kaj la arbaro. Tre similaj sonoj venis al li apud la propra hejmo.

"Bela Nederlando," li murmuras kun longa profunda spiro, "Ĉu mi iam vidos vin denove ?"

Longe ankoraŭ li restas tie. La mateno ridas pro junaĝa ĝojo, kaj la birdoj pepas gaje, dum larmoj kaj rosgutoj sendistinge perlas sur la freŝe verda herbo.

Bordo de Nederlando, Bordo de Anglujo, kiuj prezentas reciproke amikajn vizaĝojn ! Kiam denove vi ne nur rigardos, sed ankaŭ parolos tiel amike ? Kiom ankoraŭ da homoj rifuĝe venos el tiu malfeliĉa lando en ĉi tiun ? Kiam revenos al vi kaj al ni la plena libero kaj trankvilo ?

La viro turnas du pezajn piedojn al la vojo apuda kaj silente marŝas al la fremda hejmo, kie li loĝas kiel gasto. La demandon li konstante ripetas, "Ĉu iam . . . Ĉu baldaŭ . . . ?"

P. E. DA GOGO

LA INSTRUO KAJ LERNO DE ESPERANTO (II)

2.—LA LECIONO

21.—ĜENERALAĴO

211 **Rolo de instruisto.** Montri celon. Gvidi. Komprenigi. Laborigi.

212 **Rolo de lernanto.** Aspiri la celon. Lerni. Kompreni. Apliki.

213 **Laboru laŭ difinita plano.**
Ĉiu leciono estu parto de tuto, fontu el la antaŭa.

214 **Elasteco.** *Troa metodo tiel malbona, kiel nenia.*

215 **Ne konstante rekomencu por novevenintoj.**
Ĉiama unua leciono mortigos la kurson.

216 **Estu preta.** Certiĝu antaŭe, ke ĉio bezonota disponeblas.

217 **Venu frue.** Aranĝu ĉambron, seĝojn, materialojn. Bonvenigu envenantojn.

218 **Komencu akurate.** Malfrua komenco naskas malfruan ĉeeston.

219 **Finu akurate.** Sed ne tuj forrapidu. Babilu kun individuoj. *Eĉ se per tio vi maltrafos vagonaron !*

22.—PREPARO. PLANADO

Zorge antaŭpreparu ĉiun lecionon

221 **Skribu resumon (skizon)** de leciono donota.

RUBRIKOJ :

222 **Celo.** "Kion mi instruos ?"

223 **Enkonduko.** Preparaj vortoj. Rilatigo al antaŭa leciono.

224 **Prezento. Malvolvo.** Utiligo de jama scio.

225 **Priparolo. Demandoj. Diskuto.** Malfacilaĵoj.

226 **Apliko. Ekzerco.** Laborigo al lernantoj.
Unu provilo pri bona instruo : "Kiel la lernantoj laboras ?"

227 **Revizio.** Testa kaj fiksa.

228 **Hejmtasko** (Vd. 6).

229 **Listo de helpiloj (akcesoraĵoj) bezonotaj** (Vd. 8). Objektoj. Ilustraĵoj. Objektoj.

23.—GRADIGO. ORDO DE PREZENTO. PRINCIPOJ

231 **De simpla al malsimpla** (facila al malfacila).
(*Ne komencu per akuzativo, akordigo de adjektivo, inversioj*).

232 **De ekzemplo al regulo** (de faktoj al ĝeneraligo, klarigo).

233 **De afero al nomo** (konkreta al abstrakta).
"Hero-in-o" antaŭ "radiko, sufikso, finaĵo".
"Si" antaŭ "refleksiva pronomo".
"Estis leganta" antaŭ "kunmetita tempo".

234 **De ofta al malofta** (ordinara al neordinara).
Unue la ofte bezonata, ĉiutaga. "Basic Esperanto."
"Mal", "in", antaŭ "er", "ing".

235 **De konata al nekonata** (kutima al nova).
Komencu per radikoj Anglaj, literoj konataj, vortordo kutima.
Instruu "aĵ" per "pakage" ; "mola" per "emollient".

236 **De ĝenerala ideo al detaloj.** Unue la ĉefaĵo : poste malfacilaĵoj, esceptoj, aferoj diskuteblaj.

24.—SIMPLECO. KOMPRENEBLECO

241 **Instruu laŭ la lernanto** (aĝo, kapablo, klero).
Malsame al infano kaj adolto; malrapida kaj talenta ; unulingvulo kaj poligloto.

242 **Klareco de lingvaĵo.** Nenio obskura, nekomprenebla.
Tio ne signifas eviton de necesaj teknikaj terminoj.

243 **Koncizeco.** Evitu longajn frazojn, multvortecon.

244 **Paŝon post paŝo.** *"Dividu kaj venku."*
.1 **Po unu novaĵo.** Ne instruu plurajn aferojn samtempe.
.2 **Ne tro multe en unu fojo.** Ne tro ŝarĝe. Ne tro plene.
Unue la ĉefaj punktoj, kaj ili estu malmultaj.
.3 **Ne tro rapide.** *"Fulme lernite, fulme forgesite !"*

245 **Certiĝu, ke oni lernis** (*a*) **efektive,** (*b*) **ĝuste.**
Ne imagu, ke klara por vi estas necese klara por la lernanto ; ke ĉar vi komprenas, li ankaŭ komprenas ; aŭ ke ĉar vi ion diris, li ĝin ensorbis.

246 **Skeletaj notoj** por helpo al la kursanoj.

25.—KONKRETECO. INSTRUO PERVIDA, PEROBJEKTA (Vd. 8)

251 **Nigra tabulo.**

252 **Objekto** en la ĉambro (poŝo, valizo).
Persono en la ĉambro.
Ago de instruisto, de lernanto(j).

253 **Ilustraĵoj.** Tabeloj, diagramoj, bildoj.

254 **Aktualaĵoj** el la ĉiutaga vivo.

26.—INTERESO

La ĝermo de la frukto.
La risorto de lernado.
"Interesito persistas, neinteresito rezistas."

261 **Mem sentu kaj montru vivan intereson.** Intereso estas infekta. *"Keen teacher, keen class."*

262 **Diverseco.** Varieco. Evito de monotono.

. 1 **Diversigu la metodon.** Eĉ ripetante, ripetu alimaniere, kvazaŭ novaĵon. (*Ekz., Sepfoja prezento de kunmetitaj tempoj : "Step by Step", pp.* 202–212).

. 2 **Nenio tro longe** en unu fojo.

. 3 **Okaza paŭzo** por mensa ripozo. Libera babilado.
Ĉiama streĉo difektas la ŝnuron.

. 4 **Diversigu la temon.** Ne saman temon dum tuta vespero.

263 **Utiligo de instinktoj.**
. 1 **Scivolemo.** . 2 **Agemo.** . 3 **Posedemo.** . 4 **Imitemo.** . 5 **Konkuremo.** Poentoj. Konkursoj.

264 **Utiligo. Praktika Apliko.** Ne sole teorio. (Vd. 57, 7).
Vizito al Esp. kunvenoj, grupoj, kongresoj.
Legado (gazetoj, literaturo). Korespondo (unue gvidata).
Instruo pri la movado (historio, organizo, progreso).
Regulaj reportoj pri Esperanta agado.

265 **Sendependeco. Memstaro.** Prefere eltiri ol enverŝi.
Sininstruo (memvido, memtrovo).
La lernanto uzu propran cerbon. Pensinte, oni memoras.
Li esprimu proprajn pensojn, ne nur ripetu viajn.

266 **Ne tro parolu.** La lernanto ne nur aŭskultu.
Li preferos paroli mem, eĉ balbute, ol aŭskulti vian solon.

267 **Humoro. Ŝercoj. Ne timu ridi.**
Tamen ne celu nur amuzi.
Nenia amuzo sen celo. Neniu leciono sen lerno.

268 **Anekdotoj.** Simplaj. Prefere humoraj.

269 **Ludoj** (Vd. 44, 88).
La ludo estu ludo vera, ĝuata pro si.
Sed ne troe. Ne ĉiufoje. Ne tutan vesperon.
Ne ĉiam saman. (*Iu grupestro ludigis "Feliĉaj Familioj" en ĉiu vespero dum tuta jaro, kaj plendis, ke la grupanoj ne volas ĉeesti* !)

27.—LA INDIVIDUO : LA AMASO

271 Laboru ĝenerale **laŭ la mezgrada kapablo** de la kursanoj.
Tamen ne forgesu la apartajn bezonojn de 272, 273.

272 **La malrapidulo.** Ne necese stulta. Eble li estos la plej bona en la fino. Lin studu kaj kuraĝigu.
Postleciona individua helpo al timinto paroli dumlecione.

273 **La brila lernanto.**
Bezonoj : Konvena instruo kaj ekzerco.
Danĝeroj : Monopoligo de atento. Silentigo kaj senkuraĝigo al la ceteraj.

28.—TIPOJ DE LECIONO

LAŬ CELO

281 **Transdono de scio.** Instruisto laboras, lernantoj atentas.

282 **Akiro de lerto.** Lernantoj laboras, instruisto gvidas.
Kiam paroli ? Kiam laborigi ?

283 **Observo. Kompreno. Takso.** *"Appreciation lesson."*

284 **Ekzerco, Ripeto,** pri jamlernitaĵo. *"Practice lesson."*

LAŬ TEMO

285 **Pri objekto konkreta.**
(*Ekz., "Esp. Monthly,* 1915, 26, 52, *pri "penco", "libro".*)

286 **Pri temo pli abstrakta.**

LAŬ OKAZO

287 **Unua leciono.** Enkonduko al temo.

288 **Demonstra leciono** al publiko.

289 **Prova leciono** de lernanto.

29.—MEMORO. FIKSO. MENSA SUGESTO

291 **Intereso.**

292 **Pripenso. Medito. Koncentro de atento.**
Mensa resumo for de la libro.
Kion mi legis (lernis) ?
Ĉu mi konsentas ?
Ĉu mi povus ĝin klarigi al aliaj ?

293 **Ekzerco. Ripeto. Uzo.**
Pli bone malmulto ofte kaj funde, ol multo unufoje.
Nur ekzerco enstampas, fluigas.

294 Revizio. Komence kaj fine de leciono.

295 Resumado. Prezento mallonga, simpligita *Précis.*

296 Parkerado.
Formulo. Difino. Tabelo. Rimaĵo. Frazo ekzempliga.

297 Asocio. Rilatigo de du ideoj. Vojoj de pensado.

. 1 Klaso.

. 11 Klaso : klasero.
lingv-Esperant, best-bov, arme-soldat, frukt-rib.

. 12 Du el sama klaso (samklaseroj).
bov-ĉeval, ruĝ-blu, neĝ-glaci, fag-tremol, uj-ing.

. 13 Maloj, kontrastoj.
lum-mallum, viv-mort, kurb-rekt, aĉ-ek, aĵ-ec, ar-er

. 2 Parto.

. 21 Parto : tuto.
ond-mar, paĝ-libr, naz-vizaĝ, Ekzercar-Fundament.

. 22 Du partoj (de tuto).
radik-branĉ, pord-mur, form-kolor, Ekzercar-U.V.

. 3 Kvalito.

. 31 Objekto : kvalito.
plumb-pez, fajr-varm, Goldsmith-energi, stel-verd.

. 32 Du objektoj samkvalitaj.
lun-oranĝ(rond), Italuj-bot(form) ; Esperanto-aboco (facil).

. 4 Proksimeco, ĉeeco (koincido alispeca).

. 41 Loko.
Kongres-Bulonj, neĝ-mont, IEL-Heronsgate.

. 42 Tempo, sinsekvo.
kaf-maldorm, fulm-tondr, vund-dolor, labor-lac.

. 43 Celo.
Okul-vid, libr-leg, kuler-te, krajon-skrib.

. 44 Vorta simileco.

. 441 Komenco (*fort-fortik*).

. 442 Mezo.

. 443 Fino (*rol-parol*).

. 444 Rimo (*fortik-dik*).

. 445 Sono.

. 45 Litera simileco.

. 451 Vortkomence.

. 452 Vortmeze.

. 453 Vortfine.

. 46 Litera diferenco (*pes-pez, desert-dezert*).

. 47 Litera transpono (aliordigo).

. 5 Mensa bildigo.

. 6 Memorĉenoj.

ŜULDO-should-ought-owe-DEBT.

Parol rol aktor loĝi loĝ dom pord sonoril preĝej Bibli libr leg skrib plum lum mallum nokt dorm lit varm fajr akv mar ŝip vel vent blov pulm brust rust fer ŝtal ŝtel pun malliberej kaĝ bird flug aeroplan kampar farm ŝaf buĉist kolbas Germanuj Hitler hajl.

Legu trifoje. Kian rilaton havas ĉiu paro ? Ripetu parkere.

298 Memorigiloj. Mnemonikoj. *
Klasigeblaj kiel 297. Ekz., (pliparte el "Step by Step") :

32 Ĉapelo super **ŝ, ĉ.** (p. 55). Formoj de **I, K, T, Ĉ** (p. 86).

44 **Abel, miel** (p. 8). Kiel, **el***egant manner.* **ingo, in** *it* **go***es.*

441 **Ar, ar***ray.* **Ek, ek***sclaim,* **ek***splode.* **For, for***th.* **Mor**gaŭ, **mor***row.* **Pet, pet***ition.* **Pul**vo, nigra kiel **pulo.** **Serĉi** (kp. **ŝerci**) ; **ser**ioza **ĉi**am.

442 A**pen**aŭ, **pen, pa**ins. **-es,** *possessive.* **Estr,** *master ; mistress.* F**ramb,** *bramble.* Hieraŭ, *yesterday.* Hodiaŭ, *today.* **Obl,** *duoble, treble.* **Op,** *grouped ; coupled.* **-os,** *post-mortem.*

443 **Aĉ,** kr**aĉ.** **Ad,** *block***ade.** **-Al,** *real reason.* **-am,** *quond***am.** **An,** *man.* **-es,** *one's.* **Il,** *utensil.* **On,** *division, fraction.* **Stablo,** metia **tablo.**

445 **Ankoraŭ,** *encore.* **Ant,** *an* ant *is an active animal.* **Anstataŭ, instead** *of.* **Bo,** *bow, beau* (p. 244). **Ig, iĝ,** *pig, sosiĝ* (p. 122). **Kio,** *wot ;* **kiu,** *who.* **Kon,** *recognise.* **Ju . . . des,** you *first,* des *right !* **Melo** kuras **mejlon. Prujno** sur **pruno. Ul,** *individ***ual. Um, H'm, Um***pteen, thing-***um***-a-jig.*

45 **Al**menaŭ, **a***t* **l***east.* **-am,** *a.m.* **-om,** *'ow much, 'ow many.* **As, Is,** *extant, extinct.* Ambaŭ, **b***oth.* Karobo sur arbo ; karoto en tero. **D**rinki **d**anĝeron, **t**rinki **t**eon. **-el,** adverba maniero ; bone, *well !* **Eg, et,** *great, tiny.* **-o,** *object.* **S**ukero en de**s**erto, **z**ebro en de**z**erto.

451 **Ĉi-,** ch*acun.* **I-,** i*ndefinite.* **Ki-,** k*westion.* **Ti-,** t*hat.* **-S,** s*imple tense.* **D**evo, **d***uty.* **p**ovo, **p***ower.*

452 Polvo kovras en somero.

453 Pupilo de okulo.

46 Muso, muŝo, (p. 8).

47 **Ĉi,** *each.* **Kiel,** *like.* **Li,** *il.* **In,** *-nj.*

299 Mnemonikaj sistemoj.
Cifera alfabeto.
Lokalizo. Memorĉambroj.

---

* Ni ĝojus ricevi similajn mnemonikojn.—*Red.*

MIA KARA (MY BONNIE)

La kara transiris la maron,
Trans maron, ho ve, iris li ;
La kara transiris la maron,
Ho, portu la karan al mi !
Portu, portu, portu la karan al mi, al mi !
Portu, portu, reportu la karan al mi !

Blovadu, ho vento, transmare,
Blovadu transmare al li ;
Blovadu, ho vento, transmare,
Kaj portu la karan al mi.

Vespere, sur lita kuseno,
La kapo ripozis de mi ;
Vespere, sur lita kuseno,
Mi sonĝis pri morto de li.

La vento blovadis transmare,
La vento blovadis al li ;
La vento blovadis transmare,
Kaj portis la karan al mi.

NIA LETERKESTO

We thank numerous correspondents for letters of appreciation of the series "La Instruado de Esperanto".

We have received many letters on the article "Learned Ignorance" (pp. 29–30). Here are some abbreviated extracts :

"Artificial"—We are advised to reject the word *artificial* as applied to Esperanto. Should we not rather correct the prevalent ignorance of the meaning of this very apt word ? Sir Christopher Wren was congratulated on St. Paul's Cathedral, because his famous masterpiece was "so awful and artificial" ; *i.e.*, "so awe-inspiring, and made with such great art and skill".

What is called "an artificial flower" is not a flower at all, but an artificial imitation of a flower. A cultivated rose, as you say, is a true "artificial flower" ; a flower to the production of which art and skill have been applied, and therefore much better than a brier produced without such art.

R. RALPH TREDGOLD

True. Nevertheless, the current misuse of the word is definitely damaging when applied to Esperanto. And if our friend at the present day called St. Paul's an "awful" building, he would similarly risk being misunderstood by Mr. Everyman, who does not know the real meaning of the word.—Ed.

You say "The Esperantist smiles at these exhibitions of ignorance". I take a far more serious view of the matter : we must fight false statements, not just smile at them.—C. D. LANGFORD. (*Agreed! But we may fight smiling !*—Ed.)

Sanscrit—It is difficult to understand the suggestion that Sanscrit should serve as a kind of international language for the East. Sanscrit has never been a spoken language ; it was a grammarian's elaboration, and most elaborate it certainly is !

Perhaps there is a confusion here between Sanscrit and its script, the Nagari of modern Hindi. This script has one merit : it is completely phonetic—but no other. Being syllabic, it has 50 characters for simple letters, and an additional 100 for conjoint consonants. Yet Esperanto is condemned for a few hatted letters !

The differing scripts of India are a great obstacle to intercourse, immensely accentuating the differences in language. Even Hindustani appears in two different scripts : Nagari and Urdu. In N. India, though the language of the hymns is identical, the hymn-books used by native Christians are printed in three different scripts, Hindi (or Nagari), Urdu (Arabic character), and "Roman" Urdu. It is the first of these three that is being boosted as an all-India language ; and it may be this which the "clerical writer" has in mind when he speaks of Sanscrit.

As one who has wrestled at different times with Latin, Greek, Sanscrit, and Hindi, I feel keenly the absurdity of this remarkable suggestion. After laboriously trying to construct a sentence in Hindi with a transitive verb in it, I used to turn to Esperanto with a feeling that I was indeed "lying beside the still waters" ! The suggestion is camel-swallowing as camels were never swallowed before !

(Rev.) G. H. FINDLAY

NOVAJ LIBROJ

Jarlibro de I.E.L. 1943 (**Unua Parto**)—84pp. nur por membroj de I.E.L. Plena informo pri la Ligo kaj detaloj pri 598 Delegitoj. Malgraŭ la promilitaj malfacilaĵoj oni sukcesis denove fini la jaron sen deficito, kaj plibonigi la konton Gajno-Perdo je £64. Aferstato vere gratulinda !

Eterna Sopiro—Poemaro de J. Olsvanger. Dua Eldono, kun aldonita ĉarma poemo en dialoga formo : *Inter Homo kaj Dio.* Palestina Esperanta Ligo. *Adreso :* P. Laĥovicki, Kerem, Jerusalemo. Prezo ne montrita.

Hebrea Kantareto—Kolekto de 14 Hebreaj kantoj, plejparte kun muziko, redaktita de J. Kohen-Cedek. **Hebreaj Rakontoj** — Sep rakontoj el Hebrea kaj Juda lingvoj, tradukitaj de J. L. Perec kaj D. J. Rabinoviĉ-Tajc. Ambaŭ libretoj eldonitaj de N. B. Ĥavkin, Giv'ath Ŝaul, Jerusalemo, po unu respondkupono afr. Ni bonvenigas ĉi tiujn verkojn de Jerusalema Esperantistaro, kaj deziras al la serio sukceson kaj daŭrigon.

La Preĝo de Nia Sinjoro. Signifoklarigo de H. T. Hamblin. 21 pages, 6p., ĉe la tradukinto, F. W. Hipsley, 17 Abbott's Rd., Birmingham 14. Prezo 6p., afranko 1½p. "Preĝa meditilo", en Esperanto modela.

Spiritualism and Language—Colin Evans, B.A. 9d. for 12, 5/- for 100, post free, from the author, 10 St. Philip's Place, W.2.

Ĉina Kantaro—Kompilita de H. Jak. Ok primilitaj kantoj nun popularaj en Ĉinujo, kun muziko kaj vortoj en lingvoj Ĉina kaj Esperanta. Eldonita de Heroldo en Ĉunkino. Prezo ne montrita. De ĉiu vidpunkto interesa. Tamen, kvankam ni ne kritikos la muzikon, sciante, ke ideoj pri muziko malsamas en oriento kaj okcidento, ni bedaŭras rimarki, ke la akcentoj muzikaj kaj vortaj havas nenian interrilaton—kio malebligas kontentigan kantadon.

Recent Lectures

May

10. **Sutton.** Sutton and Cheam Hospital.
11. **Paddington.** Esperanta Grupo.
13. **West Ham.** Class Teachers' Assn.
17. **Southport.** Christ Church School.
18. **Southport.** St. Philip's School.
 · **Southport.** Trinity Hall.
 Southport. P.P.U.
19. **Southport.** Holy Trinity School.
 · **Southport.** Linaker Junior School,
20. **Southport.** King George V School
 Southport. All Saints' School.
 Southport. Esperanta Grupo.
21. **Southport.** Dean Cooke School.
 Southport. Meols Cop Girls' School
 Southport. Temperance Institute.
24. **Bolton.** Commercial Academy.
 Bolton. Public Library Lecture Hall.
25. **Stretford.** The Grammar School.
26. **Manchester.** Central High School (B)
 Salford. Broughton Senior Boys.
27. **Manchester.** Burnage High School (B)
 Manchester. Grammar School.
28. **Manchester.** Yew Tree Central School.
 Manchester. Didsbury Central School.
29. **Manchester.** Esperanto Society.
31. **Manchester.** St. Margaret's Central S.
 Manchester. Whalley Range High S.

June

1. **Salford.** Stowell Memorial School.
 Trafford Road School.
 Ordsall Schools (G) (B).
 Regent Street School.
2. **Bolton.** Folds Road S.G. School.
 Bolton. Derby Street S.G. School.
 Bolton. Clarendon Street Institute.
3. **Bolton.** Commercial Academy.
 Bolton. Youth Advisory Panel.
4. **Bolton.** Castle Hill Senior School.
 Bolton. Whitecroft Road Sen. Sch.
 Bolton. Local Class.
5. **Marsden.** Friends' Meeting House.
7. **Nelson.** Bradley Senior School.
 Nelson. Walverden Senior School.
8. **Nelson.** Edge End Senior School.
 Nelson. Whitefield Senior School.
9. **Salford.** Halton Bank Schools.
 Salford. St. Ambrose C.E. School.
10. **Manchester.** Ardwick Central School.
 Salford. Mount Carmel R.C. Sen. Sch.
11. **Manchester.** Moston Fields School.
16. **Shepperton.** Garden Party.
17. **Weybridge.** Esperanto Group.

Again there is no space to describe meetings of great interest. Several audiences were large (from 350 to 450 children and 20 teachers for a whole afternoon). In the above period 39 schools and 12 other meetings were addressed (6065 children 304 teachers, 466 others). Sales were over £35.

I very sincerely thank Messrs. L. Shipp and B. McGrath for untiring work in arranging itineraries; and Messrs. Harris and Steele in Southport, Ges. Hartley, Miss Haigh, and Rev. T. W. Roff, for hospitality. Also the Manchester Esperanto Society, which gave hotel accommodation for three days, and £2 towards expenses. And, not least, the Directors of Education in Bolton, Manchester, Nelson, Salford, and Southport, for official permission to visit their schools.

This propaganda work involves considerable expense for travel and incidentals. A contribution to the Propaganda Fund would be a practical way of supporting its continuance.

M.C.B.

INTERNACIA STILO

KIO estas internacia stilo? Stilo, kiu kiel eble plej fidele transdonas la "atmosferon" de la originalo, samtempe evitante tro laŭvortan tradukon de esprimoj, kiuj povus konfuzi alilingvanojn.

KIA ĝi estas? Tia, ke la leganto kvazaŭ sentas, ke li legas la propran nacian lingvon.

Vortludoj estas ĝenerale ne tradukeblaj. Idiotismon oni iufoje povas traduki laŭvorte, kondiĉe ke ne okazu manko de klareco pri la koncerna mensobildo. Ekz: *La rimarko bone trafis, Li ne flankeniris.* Sed oni ne traduku "I'm sorry to say I am full up, and can't take you to-day" per *Bedaŭrinde mi estas hodiaŭ plenplena, kaj ne povas vin preni.* Ne konsilindus traduki "Your words leave me cold" laŭvorte, kvankam nacilingve tiu esprimo koncize esprimas la fakton, ke viaj vortoj neniel min influas.

Iufoje, traduki Esperanten povas esti eĉ pli malfacile, ol traduki nacilingven, pro tio, ke la ĉefaj naciaj lingvoj jam posedas samsignifajn idiotismojn. Ekz: "A month of Sundays" = *La semaine des quatre Jeudis* (Fr.). Sendube ankaŭ nia lingvo grade akiros egale ampleksan provizon de tiaj esprimoj. La *Proverbaro* jam liveras riĉan komencon. Parenteze, ni trovas en ĝi *En la kvarĵaŭda semajno.*

Ni neniel volas diri, ke Esperanto taŭgas nur por simplaj bezonoj. Tradukoj jam faritaj (ekz: de dramoj de Shakespeare, k.s.) klare pruvas, ke Esperanto egalas ajnan nacian lingvon. La fakto, ke ne ĉiu Esperantisto atingas nivelon sufiĉe altan, montras ne malfortecon de la ilo, sed nur nesufiĉan lertecon de la uzanto.

Maksimuma klareco kaj kompreneblеco dependas de atento al signifoj, anstataŭ al vortoj. Iufoje laŭvorta traduko sufiĉas, sed ne ĉiam; kaj tion oni devas zorge atenti.

N. H. C. MACPHERSON

PUBLIKA-PRIVATA BIBLIOTEKO

Antaŭ sep jaroj mi havis nur ses Esperantajn librojn. Nun mi havas sescent.

Iam mi vizitis amikon, kiu havis multe da malnovaj libroj interesaj por mi. "Prenu laŭvole!" li invitis. Nu! Kion *vi* farus? Mi elektis 50, kaj li donis al mi ĉiujn. Tamen unu kondiĉon mi faris al mi: ke mi pruntu al aliaj Esperantistoj dezirantaj ilin legi. De tiam, kiam mi havis monon, mi aĉetis pluajn librojn; aŭ novajn, aŭ (pli ofte) uzitajn. Post unu jaro la nombro atingis 200, kaj mi katalogis ilin sur sliparo por registro de la pruntoj. Grade, per serĉado ĉe brokantejoj kaj zorga kolektado, la nombro kreskadis, kaj mi jam registris 500 pruntojn. Sed, ho ve! mi ne ĉiam rericevis la librojn pruntitajn, kaj entute kvinono de la kolekto tiumamere malaperis; pliparte la malgrandaĵoj.

Kiam venis la milito, mi dumtempe apartiĝis de la libroj, kaj la pruntado preskaŭ ĉesiĝis. Poste la sliparo estis forpakita, do mi komencis prunti senregistre—kun katastrofa sekvo: fina kontrolo montris, ke pluaj cent libroj mankas.

La nuna stato de la biblioteko estas jena: Mi havas 617 librojn, mi pruntis 1389-foje (laŭ la registro); mi perdis 250, kaj vendis aŭ fordonis 50. Pruntojn mi faras nur persone, aŭ poŝte nur al konatoj aŭ al personoj rekomenditaj de konatoj. Mi ĉiam pretas aĉeti utilajn librojn; sed pruntojn al la kolekto mi rifuzas, ĉar la respondeco estus troa.

Se per la biblioteko mi povis helpi al iu Esperantisto pli bone kompreni kaj ŝati nian literaturon, mi estas rekompencita. Se mi helpis la antaŭeniron de Esperanto, mi estas feliĉa

V. VERDA

Ni volonte presigas ĉi tiun raporton pri utila kaj imitinda laboro farata de unu homo. Ĉiu grupo devus starigi propran bibliotekon. Sed severa kontrolo estas absolute necesa. La bibliotekisto baldaŭ trovos la veron de la diro "La ĉefa regulo de librotenado estas—ne pruntedoni ilin!". Ofte homo skrupule honesta rilate monon estas tute senkonscienca rilate librojn.—Red.

Cooperative Men's Guild — The 32nd National Conference (Sheffield, May 8–9), passed the following Resolution:

"This Conference, believing that after the war Int. Co-operation and Brotherhood can be materially hastened by the removal of the language barrier, urges its Central Council to promote and encourage the learning of Esperanto by all Guildmen."

Esperanto kaj la gazetaro—Plimultiĝas leteroj kaj artikoloj pri Esperanto en la gazetaro. Interalie ni ricevis longajn kaj interesajn artikolojn el *The Rock* (Gibraltar); *Queensland Countrywoman*; kaj *Vancouver Sun*. Bonegaj leteroj de M.M. du Merton, E. D. Durrant, kaj Russell Scott, aperis en *The New Commonwealth*; ankaŭ de M. Bullock, V. Verda, kaj R. Scott, en *The Linguist*.

Tutmonda Junular - Organizo montras progreson de 232 membroj en 1942 ĝis 442 membroj en 1943. Oni aranĝos tendaron en *Bleadon, Som.*, 31-Julio ĝis 2 Aŭgusto (detalojn liveros F-ino Randall, 28 Pendennis Park, Bristol 4). S-ro A. W. Rowe, 116 Elborough Street, London, S.W.18, esperas aranĝi kunvenon en *Londono*, kaj L. E. Cresswell, 17 Hyde Place, Milverton, Leamington Spa, kunvenon en *Leamington*.

Donacoj al B.E.A. Biblioteko—M.P., Sheffield, 5/-; T. J. Gueritte, 17/6; F. Parker, kartoj; R. Thresher, libroj; R. F. Latimer, 9/-; R. Murray, 5/-; E. Cheetham, foto. Sinceran dankon.

EDZIĜO

Jones—Bothwell—Je 8 Majo, S-ro F. Jones kun F-ino Winifred Bothwell. Adreso: 10 Albert Place, Cheltenham.

MORTOJ

Burby—Je 30 Aprilo, pro malamika agado, S-ro J. Burby, el Goole (antaŭe Leeds). Dum multaj jaroj li laboris por la movado, precipe en rondoj laboristaj.

Moult—Je 14 Majo, George Moult, multjare fidela subtenanto de Bristola Esperanta Societo kaj de B.E.A.

Muenz—Je 19 Marto, Adolf Muenz, membro de B.E.A.

Over—Je 21 Marto, Doris May Over, 27-jara, el Weston-super-mare.

Robinson—Je 7 Majo, 85-jara, post longa sufero, Lt. Kol. G. S. Robinson. Prez. de la grupo en Eastbourne. Pli ol 40 jarojn li tie subtenis nian standardon energie kaj entuziasme. Esperantistaj vizitantoj ĉiam trovis bonvenigon al lia hejmo. Li multe laboris por la sukceso de la Kongreso en Eastbourne en 1913. Lia forpaso estas granda perdo por nia movado.

Thoday—En Londono, la 30an de Aprilo, S-ro A. Thoday, dum multaj jaroj fidela kaj populara membro de la Londona Klubo.

Jespersen—Laŭ raporto en *The Times*, mortis en Kopenhago je la fino de Aprilo, Prof. Otto Jespersen, aŭtoro de Novial.

LOCAL NEWS

Ashford. The Group makes good progress. Credit Balance, £3. Good results from the Exhibition.

Birmingham. Club meetings at 3.15 on Saturdays (3 Jul., 21 Aug., 18 Sept., 16 Oct., 20 Nov., 18 Dec.) at 26 Bristol Road.

Blackburn. A Summer Course at the Technical College, under the auspices of the local education authority. *Teacher :* Mr. J. R. Grocott.

Bristol. Raporto montras, ke la membraro atingis la nombron 55—ĉiuj membroj de B.E.A. 80 lernantoj en 10 kursoj. Ĉiumonata Esperanta Diservo. Grupa Biblioteko. Vigla Gazeto. Kantsocieto. Teatra Rondo. Librovendoj £28. Vere Esperanto vivas kaj floras en Bristolo.

Eastern Federation. Week-end, Sept. 10-12, at Ilford.

Eastleigh. At a meeting of regional Esperantists convened in May by Mr. J. Nix, reports were received from several neighbouring towns. Mr. J. Peart, Director of Education for Winchester, spoke on *The Future of Esperanto.*

Huddersfield. *Rambles :* Jul. 18, Aug. 14, Sept. 12, 15. *Meetings :* Jul. 31, Aug. 28. Details from 5 Central Close, Fartown.

Hull. A Hull Esperanto Fellowship has been formed, with Mr. A. E. Wood, 49 Strathmore Avenue, as Secretary.

Lancashire and Cheshire Federation. La 137-a Konferenco okazis en Prestwich, 8 Majo. Partoprenis 60 el 12 urboj. La venonta konferenco okazos en Liverpool, 24 Julio. Pluaj detaloj en la Federacia Bulteno.

Londona Diservo. En St. Ethelburga's Church, 72 Bishopsgate, E.C.2, at 3.30. 11 Jul., 8 Aŭg. (S-ro Tredgold).

Londona Laborista Esperantista Klubo. Ĉe Trade Union Club, Gt. Newport St., W.1 (Leicester Sq. Stn.). 17 Jul., Religio kaj la laboristaro. 21 Aŭg., Rusa influo postmilita. 18 Sep., Kien Virinoj ? 6.30. Ĉiu Esperantisto bonvena.

London Club (153 Drummond Street, Euston, N.W.1). Meetings every Friday night at 7.0. Also Jul. 10 and Aug. 14 (Saturdays), at 3.0. Visitors welcome.

Manchester. 2.30, ĉe 39 High St., M/c 4. 31 Jul., Edukaj Metodoj. 28 Aŭg., Ĉu homo restu sklavo al maŝino ?

N.E. Federation. An enjoyable programme at Durham (15 May) included a play by children from Richard Hind School, Stockton, who are making excellent progress ; a propaganda sketch by the Newcastle Group ; and a lantern lecture by Mr. A. R. Fairbairn.

Paddington—The new group is going strong ; 17 members in the first three weeks. The first four weeks had lectures on *The Rôle of a Group ; The Cseh Method ; Esperanto for Children ; Conjuring as an aid to Language-teaching.* Future meetings : Tuesdays, 7.0.

Rochdale. *Rambles :* Jul. 17, Aug. 7, 28 ; Sept. 11.

Scottish Congress (Glasgow, May 22). 100 were present. A resolution was passed for the inclusion of Esperanto in school curricula. A Committee was formed to compile a new text-book for beginners. Next year's Congress : Dundee.

Walthamstow. Group meetings : Mondays, 7.30, from 28 June to 26 July, at Educational Settlement, Greenleaf Rd.

Yorkshire Federation. 85 from 11 towns met in Dewsbury on 3 April for the business meeting : 150 attended the public meeting in the evening. The Mayor and the Director of Education were present, and warmly supported the movement. Mr. Hirst gave a specimen lesson to children from various schools.

HE KNEW ZAMENHOF

Recently, while another speaker occupied the platform, I took my turn selling literature outside the gates at a Hyde Park meeting. A young man with a slight foreign accent came up and bought a copy of every book available. "It is funny," he said, "but till I heard your lecture just now I did not think Esperanto would be of use to me, and I never thought I should bother to learn it. But now I shall. I have always been interested in references to the language, because I knew Dr. Zamenhof personally, when I was a boy ; I was a patient of his in Poland, and always felt great personal affection for him."

To me, who first heard of Esperanto only long after the Majstro was dead, it was uncanny to hear that I had converted one who knew personally the great "historical figure", as remote personally from me as if he had lived B.C. ! It was as if to a mathematician there should come somebody saying "I knew that man Euclid, back home in Greece, but never thought I should bother with his geometry till I heard you explain how useful it was !"

COLIN EVANS

LA PREĜO DE LA AVINO

Mi preĝas, ke mi post la morto
  Fariĝu ĉielano—
Kun krono, eble, sur la kapo,
  Kudrilo en la mano.
Neniam lernis mi muziki,
  Nenian harpon volas ;
De la naskiĝo ĝis la morto
  Kudrado min konsolas.
Do laŭ kutimo mi laboru,
  Flikante vestĉifonojn ;
Kontente mi riparus etajn
  Anĝelajn pantalonojn !

EUGENE FIELD
Trad. WALTER SEVERN

Small Announcements

1d. per word. Minimum 1/- per issue. Prepaid. *Copy must be received at our offices by the 6th of the previous month.*

Book-keeping and Accountancy : Hotel Book-keeping : Commercial Arithmetic, taught by correspondence. Fee 5/- monthly. Unprecendented demand for those qualified —salaries £300. Positions found qualified students. Brochure, testimonials, prize scheme, stamp. W. Jackson, F.C.I.S., F.L.A.A., 21 City Road, London, E.C.1. (Founded 1908).

Wanted—La Biblio (used), india paper. L. Hunter, 15 Temple Street, Rugby, Warwicks.

All enquiries about the **Workers' Esperanto Movement** should be addressed to : S.A.T.E.B., 79 Bent Street, Manchester 8.

Esperantisto kelkjara urĝe bezonas nemeblitan loĝejon,—ju pli malgranda, des pli bona—aŭ en Somersetshire aŭ Gloucestershire. Bonvolu sendi ian informon al S-ro C. O'Connor, 31 Caversham Road, Reading. Antaŭdankon al ĉiu korespondonto.

Typewriting—Letters (strictest privacy guaranteed), addressing. Poems, Authors' MS, speciality at 9d. per 1,000 words. Requirements met. F. G. Rayer, Hillworth, Longdon, Gloucester.

£150–£300 salary for Certificated Bookkeepers (both sexes). Unprecedented demand for those qualified. Expert postal tuition. Fee 5/- monthly. Positions found. Booklet, testimonials, stamp. C.C. College (B.E.), 21 City Road, London, E.C.1

Skoltoj ! Aliĝu al Skolta Esperanto-Ligo, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

Esperantisto (46) deziras korespondadi pri ĉiuj temoj, ankaŭ Esperantlingvaj. Ne kun komencant(in)oj. Edgar J. Smith, 21a Hampton Place, Brighton.

Official Notices

THE BRITISH ESPERANTO ASSN., INC.

President : Miss Margaret Jay, M.A.
Hon. Secretary : Bernard Long, B.A
Hon. Treasurer : Arthur C. Oliver.
Acting Secretary : Cecil C. Goldsmith.
Education Secretary: M. C. Butler, M.R.S.T.

NEW FELLOWS

J. Farrand	*Petersfield, Hants.*
Miss C. Isaacs	*Manchester*
M. Lewin	*Dunstable*
C. Sleigh	*London, E.2.*

CANDIDATE FOR FELLOWSHIP

J. F. Souter, *Edinburgh* 6

NEW MEMBERS

Ordinary Members—

Ackers, S.	*Rotherham*
Andrews, Mrs. N. M.	*Bicester*
Bailey, E.	*Ashford, Middx.*
Baker, R. St. Barbe	*Puncknoll, Dorset*
Bedwell, Miss M. C.	*Rowton Castle, Shropshire*
Birtwistle, W.	*Bournemouth*
Brown, Miss M. K. F.	*Elgin, Morayshire*
Butlin, E.	*Huddersfield*
Chapman, J.	*Bolton*
Clark, J. H.	*Folkestone*
Clinton, B. A.	*Canadian Army*
Coulton, Miss A.	*W.A.A.F.*
Darling, J.	*Gorebridge, Midlothian*
De Jongh, T.	*North Harrow*
De Waal, S.	*Dutch Royal Brigade*
Dodsworth, Mrs. A.	*London, W.11*
Dodsworth, G.	*London, W.11*
Dugdale, Miss E. W.	*Waddington, Lancs.*
Eliasson, L.	*Over-Winsford*
Fairbairn, Rev. R. E.	*Windermere, Ont., Canada*
Farmer, J. A.	*Ryde, I. of W.*
Fillingham, H.	*Nottingham*
Foster, Miss E.	*Bristol*
Foxlow, Miss D. E.	*Urmston, Lancs.*
Gadsby, G.	*Stoke-on-Trent*
Gill, Miss B. R.	*Southampton*
Grosvenor, Rev. A. B.	*Hull*
Grugeon, C. L., B.A.	*Henley-on-Thames*
Hale, Miss M.	*Leeds*
Hamilton, M. G.	*Romsey, Hants*
Hartley, C.	*Liverpool* 11
Hill, E. L.	*Rock Ferry, Cheshire*
Hill, L.	*Colne, Lancs.*
Holmes, R.	*Hykeham, Lincoln*
Hosni, M.	*Cairo, Egypt*
Hounslow, Miss K.	*Stockport*
Huddleston, F.	*Wolverhampton*
Ibrahim, Sh.	*Whitby, Wirral*
Jones, Miss O. E.	*Birmingham* 17
Kirk, H. J.	*Whitefield, Manchester*

Klaveren, Y.Y.u.	*Dutch Navy*
Leiderman, J.	*London, E.14*
McKnight, L.	*Kilmarnock*
Marshall, Dr. J. M. F.	*Bolton*
Moilliet, Miss F. K.	*Maidenhead, Berks.*
Mundy, D. N.	*London, S.E.23*
O'Connor, C.	*Reading*
Pinks, R. S.	*Worcester Park, Surrey*
Poole, Miss N.	*Preston, Lancs.*
Sephton, Miss M.	*St. Helens*
Shepherd, R. B., B.Sc.	*London, S.E.3*
Shipman, Mrs. A.	*Birkenhead*
Shipman, A. E.	*Birkenhead*
Sinclair, Mrs. W.	*Chilwell, Nottingham*
Sinclair, W.	*Chilwell, Nottingham*
Taylor, M. G.	*Wigan*
Tennant, Miss J. M.	*Bathgate, W. Lothian*
Thurgood, Mrs. T., M.A.,	*York*
Todd, Miss M.	*Colne, Lancs.*
Tuck, J. P.	*Liverpool 13*
Turton, G.	*Huddersfield*
Warren, D. T.	*Addiscombe, Surrey*
Waters, I. P.	*Southampton*

Junior Members—

Andrews, Miss J. M.	*Bicester*
Brann, K. J. C.	*Minehead, Som.*
Dodgson, E.	*Gateshead*
Griffiths, Miss W.	*Grimethorpe, Yorks.*
Hughes, Miss M.	*Stockport*
Hunter, Miss J.	*Gatehead, Kilmarnock*
Rickards, P. W.	*Dagenham, Essex*
Scofield, Miss P. M.	*London, N.14*
Sharp, D. C.	*Liverpool 15*
Stroud, F. W.	*Stockbridge, Hants.*
Taylor, A. W.	*London, N.W.8*
Turner, L. R.	*Dagenham, Essex*
Venables, D.	*Southport*
Watson, D.	*Nottingham*
Youatt, Miss B.	*Manchester 20*

NEW AFFILIATED GROUP

Dundee—Sec.: J. L. Lambie, 10 Martin Street.

DONATIONS TO B.E.A. DURING APRIL AND MAY

General Funds—J. A. Peart, 2/–; J. MacLean, 10/–; C. R. Forster, 3/6; H. Pinder, 1/6; Dr. A. H. Wortman, 8/–; J. S. Bagnall, 7/9; S. H. Larking, 5/–; Miss M. Dickson, 6/–; Miss J. Rowlandson, 2/6; W. Joynson, 1/–; E. Holt, 5/–; S. Tauber, 2/–; H. W. Burgess, 2/–; E. Rosslyn Mitchell, 30/–; C. T. Walls, 1/–; E. L. Hill, 1/–; M. P. Sheffield, 10/–; A. Prince, 22/4; Miss A. L. Beveridge, 6/–; Miss M. M. Caswell, 5/–; T. C. Fraser, 7/–; J. Cresswell 2/6.

Advertising Fund—J. Cresswell, 2/6; W. K. Robinson, 20/–; C. W. Sinclair, 3/6; E. Biddle, 3/–; E. Long, 6/5; W. C. Pearce, 2/–; Rev. R. G. Millidge, 7/–; A. Dodd, 16/–; F. Crane, 7/–; Miss M. Dickson, 10/–; Miss M. Langrick, 10/–; Iu 2/6; F. A. C. Smith, 16/–; D. R. T. Jones, 20/–; Miss L. M. Leathers, 2/6; C. W. Sinclair, 5/6; V. Broomhall, 4/3; R. Brash, 2/–; D. B. Gregor, 7/–; E. Rosslyn Mitchell, 40/–; G. D. Edwards, 5/9; C. S. Redding, 8/–; J. H. Riley, 2/6; R. H. Williams, 4/3; K. W. Donne, 1/3; Pontypool Esp. Group, 10/9; C. W. Sinclair, 4/9; Anon. 2/–; Mrs. E. M. Kendrick, 10/–; St. Helens Esp. Group, 10/–; H. J. Kirk, 1/–; Dr. W. A. Gibson, 8/3; Mrs. M. Booth, 1/3.

Motor Car and Propaganda Fund—Miss M. Dickson, 5/–; Miss E. Baldwin-Smith, 2/–; M.P., Sheffield, 5/–; Mrs. A. M. Merchant, 5/–.

These donations are acknowledged with grateful thanks.

B.E.A. EXAMINATION SUCCESSES

Preliminary—*Mrs. I. H. Caldera, *Perth, Western Australia;* D. Connell, *Glasgow;* *B. B. Foster, *Wallington;* *F. G. Rayer, *Longdon, Gloucester;* *Miss O. E. Strempel, *Wembley Park, Australia;* L. R. Pope, *Fareham;* *Miss M. F. Adamson, *Mrs. M. C. Fraser, *Miss J. D. Ramsay, Miss J. I. Gass, *Kirkcaldy;* Miss M. L. Boyd, *Dysart;* Miss I. B. Thomson, *Buckhaven.*

Diploma—W. Clarke, *Dunfermline;* *Miss S. V. Reed, *Letchworth;* Mrs. K. R. Schwerin, *P. E. Schwerin, *Sydney, Australia;* K. A. Sly, *Slough.*

Advanced by Correspondence—G. F. Millne, *Timperley;* *D. B. Runswick, *Leicester.*

* *With Distinction*

COUNCIL MEETING

at Southport, May 22nd, 1943

Present:—The President (in the Chair), the Hon. Secretary, the Hon. Treasurer, R. Anderson, Miss E. Baldwin-Smith, J. M. Baxter, W. B. Currie, Miss E. C. Goldsmith, J. R. Grocott, W. H. Hirst, Mrs. E. M. Kendrick, Miss M. Langrick, Miss S. V. Reed, L. Shipp, Miss E. M. Wheatley, Miss N. Wilford.

In attendance:—The Acting Secretary, the Education Secretary.

Finance and Sales—The Acting Secretary submitted figures for the four months January–April, which showed marked increases over 1942 in Subscriptions and Sales. Against this there were increased expenses in some directions, but the general position was very encouraging.

Fellows—Mr. J. Farrand, Miss C. Isaacs, Mr. M. Lewin and Mr. C. Sleigh, were elected Fellows of the Association.

Committees—These were re-appointed as follows :—

Executive Committee : The President, the Hon. Secretary, the Hon. Treasurer, Miss R. A. Davey, E. D. Durrant, Miss V. C. Nixon, R. Robertson, Mrs. E. Warren.

Education Committee : Miss V. C. Nixon (Secretary), M. C. Butler, Mrs. G. Cowper, B. Long, Miss G. H. Moxon, Nowell Smith, H. G. Toms.

Examiners—Mr. A. R. Fairbairn was appointed an Examiner for the Licentiate Examination. Mr. P. Schwerin, of Sydney, was appointed a Special Examiner in Australia.

MEMBERS SERVING IN H.M. FORCES

Members serving in His Majesty's Forces are asked to register with the Association a permanent address, such as their home address or that of a relative, from which they are certain that letters and other communications will be forwarded to them. They are specially asked not to register military addresses, since these may be subject to frequent changes.

CECIL C. GOLDSMITH, *Acting Secretary*

Notes from the Office

Literary Competitions—The results of the Competitions announced in January were as follows :

1. *Translation from "Pickwick".* First Prize of 21/- : Mr. A. V. R. King, Bristol. Additional Prizes of 10/6 each : Mr. G. E. Munn, Sheffield, and Miss S. V. Reed, Letchworth.

2. *Original Short Story.* First Prize of 21/- : Mr. T. Fraser, Kirkcaldy. Additional Prizes of 10/6 each : Rev. J. S. Dinwoodie, Pittenweem, and Rev. D. W. Robson, Chesterfield.

There were a good number of entries for each competition, and many of them were excellent, especially in the case of theTranslation. It is hoped to announce further competitions at a later date.

Southport—Hearty congratulations and thanks to the Southport Group, and to the Lancashire and Cheshire Federation, on the success of the arrangements for the Annual General Meeting. This was much better than anticipated, and, in fact, was almost as good as a peace-time Congress.

A small leather bag containing crochet work was left behind after the meeting at Salt's Cafe. The owner should claim it from Miss C. M. Liversidge, 60 Norwood Avenue, Southport.

Books—The present editions of *The Esperanto Home Student* and *A Key to Esperanto* are almost exhausted. New editions are in the press, but owing to heavy increases in the cost of paper and printing the prices will be 9d. and 2d. respectively. I.E.L. is printing an edition of the French Key, and it will probably be ready by the time these lines appear—price 3d. In all cases, postage is extra.

B.E.A. Finance—Figures to the end of May :—

	1942	1943
Subscriptions	£492	£592
Donations	£47	£53
Sales	£512	£805
Popular Course enrolments	443	569

Membership—New members may now enrol for 2/6 until the end of this year (if under 18—1/3). This is an excellent time for enrolling friends, and an application form is on the back cover.

C.C.G.

Enigmo.—Kio estas la diferenco inter knabino flirtanta kun Pola soldato, kaj lana trikoto ? Ŝi deziras *Pol-okulumon*, kaj ĝi havas *polo-kolumon*.

International relations after the war.—What appears to be lacking for international understanding is the official adoption of the international language Esperanto. Esperanto should be taught in every school, and used in all international affairs. Improvement in international relations would automatically follow.—*J. Brownlee, in "Perthshire Advertiser."*

The British Esperantist

Publishers (Eldonistoj) :

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.
HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS.
Tel. : Chorley Wood 138

Editor (Redaktisto) : MONTAGU C. BUTLER, M.R.S.T.,
36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THAMES, SURREY.
Telephone : Kingston 1484

SUBSCRIPTION *(including postage to any part of the world)—Twelve months,* 2/6. *Single copies cannot now be supplied. (Free to B.E.A. members).*

ADVERTISMENT RATES *will be quoted on application to the Secretary.*

MANUSCRIPTS *should be typewritten, and addressed to* THE EDITOR. *The Editor is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned. He reserves the right to refuse, correct, or shorten contributions received. Matter should be received by the 8th of the month.*